Al la Centra Oficejo
de la
Universala Esperanto Asocio
Eendrachtsweg 7 Rotterdam C
Nederlando

Nürnbergo, la 15. de Marto 1958

Tre ŝatataj Geoj Gesanoj!
La sekretario de la Brita Liberpensula Esperantista Asocio
Nia Sano Sro George L. Dickinson Liverpool 10
21 Gribble Road Lancashire Britujo
intencas arangi fakkunsidon de la
Humanisma kaj Etika Kulturo ribate
de la II mondkongreso de la Internacia
Humanisma Etika Unuiĝo en London
je la 26-31. de Julio 1957.
kaj ĉar en Germanio ĝis nun ne funkcias
Germana Liberpensula Esperantista Asocio
li petis min, prepari la aranĝajon.
La sekretario de la Germana Popol Asocio por
Spiritlibereco, Sro superregistara konsilanto
Alber Hener Hannover Sedan Str 14
sendis al mi longan konsentan leteron kaj
salutis nian intencon en la nomo de la
Germana Popol Asocio por Spiritlibereco kaj
deklaris la pretecon helpi nin laŭ povo.
La estraro de la Liberreligia Unuiĝo en
Mainz Gartenfelder Str 1. permesos kunveni
en la nov konstruita kunven halo
Sro Dro Dietrich Bronder Hannover Brühl Str 9
la delegito ĉe la II mondkongreso de la
Internacia Humanisma kaj Etika Kulturo
kaj la prezidanto de la organiz-fako ĉe la sama
kongreso estos la prelegonto ĉe la fakkunsido
en Mainz

I.

ÖSTERREICHISCHE NATIONALBIBLIOTHEK
709.752-C
ESP. M. 3

709.752-C. Esp. M. 3

Österreichische Nationalbibliothek Digitale Services

La sekretario de la Konstanta Kongres Sekretario
Sano Sro G. C. Fighiera skribis al mi:
Se vi deziras, tial kunveni en Mainz
vi devas unue havi fondkunvenon kaj
en venontaj jaroj, kiam la Asocio fakte
ekzistas kaj aktivas, vi mendu fakkunvenon
Kun sinceraj salutoj
G. C. Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario.
Laŭ la Jarlibro 1957, Unua parto, paĝo 57
mi petas Informojn, ĉu al la Centra
Oficejo estas konvena aŭ ne konvena,
ĉu estas deca aŭ ne deca, se la britaj
kaj la germanaj liberpensuloj kunvenas en
Mainz por propagandi por Esperanto, por
Humanismo kaj Etika Kulturo.
Laŭ la Oficiala Komuniko Nr 5 Februaro
1958 anoncis Fakkunsidojn – Spiritistoj
Militrezistantoj kaj Kristanoj.
La esenco de la Humanistoj kaj de la Etikistoj
estas konata al la Centra Oficejo, kiel la
esenco de la Spiritistoj kaj Kristanoj.
Mi demandas la Centran Oficejon, ĉu en
la kadro de la Kongres-Programo ne
estas loko por Humanismo kaj Etiko?

Nia majstro Zamenhof kreis Esperanton
por ĉiuj popolanoj de la tero.
Ni liberpensuloj estimas, ŝatas kaj toleras
ĉiujn religiajn dogmojn,
sed ni mem ne havas dogmojn.

II

Nia kutimo estas la toleremo.
Nia movado ne estas sen konata en la vicoj de la Universala Esperanto Asocio, ĉar jam je la 15. Universala Kongreso en Nürnbergo 1923 la Konstanta Kongres Sekretario helpis al ni, aranĝi fakkunsidon en la salono de la Nürnberga Frauentorschulhaus kaj la Asocia Prezidanto salutis nian kunagadon.
Se la sangon soifantaj jaroj post 1939 detruis ĉi tian pacan agadon, ni nun nur daŭrigas, kion la milito interrompis.
Antaŭe mi dankas por Via konsenta respondo:
Se niaj membroj ne sufiĉe konas la kontakt metodojn laŭ la kongres modo la partopreno je la kongreso povas forigi ĉi tiujn malagrablaĵojn

samideane kaj sincere
salutante
Ernst Gemeinhardt

III.